

LA PONTO

Tweemaandelijks tijdschrift van de Limburgse Esperantovereniging.



Jaargang 7, nummer 4 (40) november-december 2014

Verschijnt op de eerste dag van iedere onpare maand.

Erkenningsnummer: P808228

V.U.: Pieter Jan Doumen, Peerderbaan 81, B-3940 Hechtel-Eksel

Tel. 011-73.20.47 – E-mail: pieter-jan.doumen@telenet.be

LA PONTO

Senpaga dumonata periodaĵo de la
Limburga Esperanto-Asocio (L.E.A.)
Aperas la unuan de ĉiu nepara monato.

Limdato por artikoloj: la 1-a de ĉiu para monato
Jarkolekto 7, n-ro 4 (40): novembro-decembro 2014
Ĉiuj antaŭaj numeroj ankoraŭ haveblas ĉe [http://
esperanto-forum.net/doc/LaPonto/archief.html](http://esperanto-forum.net/doc/LaPonto/archief.html).
Redaktoro: Pieter Jan Doumen, Peerderbaan 81,
B-3940 Hechtel-Eksel - Tel. 011-73.20.47
Retadreso: pieter-jan.doumen@telenet.be

Redaktore...

Karaj Gelegantoj,

Tiu ĉi numero de La Ponto jam estas la lasta de la jaro 2014. Kiel rapide kaj senkompatas pasas la tempo!

La longaj aŭtunaj kaj vintraj vesperoj devigas nin restadi en la domo, invitas nin rigardi interesan televidprogramon kaj al legado de interesa libro. Oni ne povus troigi la gravecon de legado de lingvo kiun oni deziras regi. Multajn esperantajn vortojn oni tuj komprenas pro ilia simileco al francaj, anglaj aŭ germanaj vortoj, ĉe tio helpate de la kunteksto. Ekzistas multaj interesaj bone tradukitaj kaj eĉ originaj romanoj en Esperanto. Profitu de tiuj du sezonoj por pliriĉigi vian vortrezoron kaj evoluigi vian lingvosenton per legado. Kaj ankaŭ ne hezitu uzi vortaron, se vi ne komprenas vorton, kio malhelpas vin bone kompreni frazon. Se oni regule legas, oni tuj komprenas la vorton kiam oni renkontas ĝin duafoje. Laŭ franca proverbo, nur la unua paŝo estas malfacila!

Dume mi deziras al vi agrablan legadon kaj bonan jarfinon!

Pieter Jan Doumen

Historio de Esperanto en Belgio (3) (Geschiedenis van het Esperanto en België, 3)

«Oni ne pensu, ke ni ĉion diris pri la progresoj de Esperanto en Belgio. Jen tio, kion ni skribis por la eldono de *Le Petit Bleu*, kiu eliros la 17-an de la nuna jaro.

«El Spa la gajega urbeto ardena, ni ankaŭ ricevas informojn, pri kiuj ĝojos ĉiuj partianoj de la nova lingvo. Je la 27-a de la pasinta monato, s-ro Charles Hault donis en la arta kaj literatura rondeto de la nomita urbo antaŭ granda aŭdantaro la unuan lecionon de la publika kurso de la lingvo internacia. Pri tio presis gazeto de tiu urbo, *La Tribune de Spa*,

longan artikolon, el kiu ni tiras la sekvantajn liniojn: «La simpleco de tiu ĉi lingvo (Esperanto) estas tiel granda, ke dum la merkreda kunsido, post la parolado de s-ro Hault, la plimulto de la ĉestantoj faris laŭte kaj senprezare la tradukon de la letero, kiun la parolanto estis skribanta sur la nigra tabulo... Ekster ĝia grandega simpleco, tiu lingvo estas riĉa kaj ĉarmada la orelojn. Ĝi certe posedas la necesajn ejojn por ricevi grandan sukceson.»

Tio, kion ni komunikis pli supre, elvokos certege vivan ĝojon ĉe niaj amikoj; ĝi kuraĝigos ilin al propagando por Esperanto kaj decidos multe da ŝanceliĝantoj por aliĝi al ni. Ankoraŭ multe pli interesa estas tio, kio al ni restas por sciigi al nia legantaro. Ĉiu scias, ke la ĵurnaloj, precipe la gravaj ĵurnaloj, ne montras multe da rapideco por helpi nin publikigi la artikolojn, pri kies lokigo ni ilin petas, aŭ por anonci la malfermiĝon de la publikaj kursoj, aŭ ankoraŭ por sciigi la fondon de vastiganta klubo. Nu, unu gazeto brusela, unu el la plej gravaj kaj legataj en Belgio, ne sole donas al ni la malavaran helpon de ĝiaj kolonoj, sed eĉ nin subtenas kaj baldaŭ helpados grandamezure ĉe la universala vastiĝado de Esperanto.

Kelkaj fremdaj esperantistoj skribis al «Le Petit Bleu» por anonci, ke ili abonis la nomitan ĵurnalon, se ĝi daŭrigus elirigi ĉiudimanĉe la kronikojn esperantistajn, kaj kelkaj anoncis, ke ili estas pretaj sendi senpagajn artikolojn, verkitajn en la nova lingvo. Ni proponis al la direktoro de la gazeto efektiviĝi *dimanĉajn*



abonojn solege por esperantistoj. Ni rimarkigis al li, ke ni trovis librovendejon, kiu pretas aranĝi kiel eble plej frue ekspozicion. Nian proponon oni akceptis kun entuziasmo, kaj tuj kiam la ekspozicio estos ricevinta leterojn, poŝtajn kartojn k.t.p. en nombro sufiĉe alta, la ekspozicio malfermiĝos. Jen ankoraŭ bonega rimedo por konigi nian lingvon al la publiko. Ni pensas, ke estas eble rapidigi aranĝon de tiu

ekspozicio kaj jen kial : nia legantaro sendube juĝos, ke *Le Petit Bleu* liveras al ni grandan helpadon, kaj ke ni devas sen malfruo montri nian dankon. Nu, la societoj esperantistaj kaj personoj kiuj povas fari tion, abonu la dimanĉan eldonon kaj ĉiuj sendu al la ĵurnalo *Le Petit Bleu* poŝtan karton aŭ leteron, per kiu li dankas por la aminda helpado kiun ĝi donas al nia afero. Poŝtkarton aŭ leteron ĉiu povas sendi, kaj ni petas ĉiun fari tiun malgrandan elspezon por la bono de nia karega afero. La artikoloj, kiujn niaj legantoj preparos kaj kiuj normale ne devos enhavi pli ol 500 ĝis 600 vortojn – ili ankaŭ povus enhavi nur 200 vortojn – devos esti sendataj rekte al la dirita ĵurnalo.

Bruselo, la 14-an de aprilo 1898.

Ed. Blanjean


3. Charles Lemaire, la belga Kabe¹

Charles Lemaire, leŭtenanto, poste komandanto en la belga armeo, estis la unua kiu vere aktivis per propagando por Esperanto. Zamenhof nomis lin «la vera patro de la belgaj esperantistoj», sed jam en 1908 li malaperis de la scenejo.

Charles, François, Alexandre Lemaire naskiĝis en la vilaĝo Cuesmes la 26-an de marto 1863. Li perdis frue siajn gepatrojn kaj konis multan mizeron. Li faris siajn mezgradajn studojn en la gimnazio de Mons. Bonaj studrezultoj kondukis lin al la Armea Altlernejo de Belgio, kie en 1886 li akiris la gradon de leŭtenanto kaj fariĝis, la 12-an de junio 1888, oficiro en la 2-a Artileria Regimento.

La aŭtonoma ŝtato Kongo (la nuna Zaïre) ĵus estis fondita de la belga reĝo Leopoldo la II-a. Li entuziasmiĝis por tiu grandega entrepreno, estis elektita por gvidi ekspedicion tien kaj enŝipiĝis por Afriko la 4-an de novembro 1889. Kvar jarojn li tie pasigis en la distrikto de la Kataraktoj (malaltaj akvofaloj), poste kiel komisario de la distrikto Ekvatoro, kaj dume li kutimiĝis al la kolonia vivo kaj ĉiuflanke montris sian senlacan agemon kaj grandan organizan talenton kaj inciatemon

Plurfoje komisiita de la reĝo por sciencaj ekspedicioj en Kongo, li rapide promociis al



Charles Lemaire (1863-1926)

kapitano en 1898 kaj kapitano-komandanto en 1902.

En 1893 li revenis al Belgio por resaniĝi de grava vundo: kuglo, pafita de nigrulo, estis traborinta unu el liaj kruroj. Tiu vundo dolorigis lin dum kelkaj jaroj, kaj li nur resaniĝis post kelkaj operacioj. Intertempe li ne ripozis dum unu momento, sed per multaj broŝuroj li diskonigis la rezultatojn de siaj laboroj en Afriko.

Sed sub la agemulo kaj scienculo montriĝis ankaŭ la soldato: li neniam kaŝadis siajn opiniojn pri la belga entrepreno en Kongo kaj ĉiam kaj ĉie defendis siajn amatajn ideojn per la voĉo kaj la plumo.

En 1895 li reiris al Kongo kun la komisiono esplori la eblecon konstrui fervojojn de Matadi al Léopoldville (la nuna Kinŝasa).

Laŭvice oni vidis lin kontraŭbatali la malamikojn de la kongolanda entrepreno, energie helpi ĉe la fondo de la Asocio por Koloniaj Studoj kaj poste la Kolonia Lernejo, kies direktoro li estis dum siaj lastaj vivojaroj.

¹ Kabe, pseŭdonimo de Kazimierz Bein, pola esperantisto, kiu estis konsiderata en sia tempo kiel la plej bona esperanta stilisto. Li forlasis la movadon

post disputo kun D-ro Zamenhof. La verbo 'kabei' signifas 'forlasi la movadon' post aktiva periodo.

Post lia reveno multaj entreprenoj postulis lian energion: fondo de la «ville Coloniale» (kamparodomo por malsanuloj revenintaj el Kongo) en Watermael, la preparo kaj la organizo de la Sud-Polusa Ekspedicio de komandanto de Gerlache, fondo de la filantropa entrepreno «Plenaero por la Etuloj», organizaĵo kies ĝenerala sekretario li estis kaj kies celo estis sendi kiel eble plej multajn malriĉajn infanojn al la kamparo aŭ la marbordo.

En 1898 li denove enŝipiĝis por Afriko por gvidi grandan scienca mision en Katango. Tiu ekspedicio, dum kiu li travojaĝis la tutan Afrikon de okcidento ĝis oriento, altiris la atenton de la tuta scienca mondo kaj havigis al li la plej altajn honorojn kaj dekoraciojn.

Tiun rimarkindan vojaĝon li priskribis en serio da verkoj, i.a. *Tra Mez-Afriko* (dulingva verko: franca kaj esperanta). Li ankoraŭ ne finis la laboron pri la lasta ekspedicio, kiu finiĝis fine de la jaro 1900, kiam, la 3-an de oktobro 1905, oni elektis lin dum la unua kunsido de la Belga Ligo Esperantista kiel unuan prezidanton. Tiun funkcion li plenumis ĝis la 20-a de septembro 1908, kiam li oficiale transiris al la tiama reforma movado Ido.

Li mem ankaŭ faris reformprojekton, kiun li nomis Ilo.

Dum liaj lastaj jaroj li estis direktoro de la Kolonia Universitato de Antverpeno, kaj ne plu okupiĝis (almenaŭ ne publike) pri la interracia lingvoproblemo.

Li estis 63-jara kiam li mortis en Bruselo la 20-an de januaro 1926.

Lemaire estis tre influrica persono. Se oni pristudas la liston de la unuaj Esperantistoj en nia lando oni tuj rimarkas la grandan kvanton da armeaj oficiroj (inter kiuj ankaŭ medicinistoj, kuracistoj aŭ lernantoj de tiuj profesioj). Sendube pro tio ŝuldas lia influo. Oni povas ankaŭ miri pri la interesiĝo ĝuste pri tiuj profesioj. Sed multe klarigas la vera grandanimeco, humaneco kaj moderneco de la ideoj de Lemaire. Ni ekzemple esploru lian broŝuron *Tra Mez-Afriko*, kiu estas la teksto de lia parolado donita dum la Dua Universala Kongreso de Esperanto en Ĝenevo je sabato la 1-a de septembro 1906. (*Daŭrigota*)

Eriko D'Hondt kaj Petro De Smedt


Novaĵoj el Esperantolando

(Nieuws uit Esperantoland)

Belgio 1 – Marcel Aerts de Hasselt mortis –

Jam dum kelka tempo ni ne plu havis kontakton kun Marcel Aerts, sed la lastajn semajnojn

circulis la famo, ke li mortis aŭ estis grave malsana. Post demando al la urbodomo de Hasselt, oni informis min, ke Marcel forpasis jam la 3-an de julio 2014. Ni trovis la novaĵon kaj de lia morto en neniu retejo 'In Memo-



riam', neniu esperantisto ricevis informon pri lia morto. Marcel Aerts, kiu naskiĝis en Hasselt la 1-an de majo 1925, estis ĝis alta aĝo pionira aktivulo de Esperanto en nia provinco. Li konatiĝis kun Esperanto en 1983 dum unu el niaj kursoj en la Kultura Centro de Hasselt. Poste li sekvis dum du jaroj vesperkurson en Antverpeno. Tre baldaŭ li fariĝis la prezidanto de la rapide kreskanta Esperanto-klubo de Hasselt. Dum multaj jaroj li instruis la lingvon.

Albert Claesen

Nederlando – Terminologia studo en Vieno -

Jam la duan fojon UEA anoncis konkurson por subvenciita partopreno en la terminologia somerlernejo, okazigita en Vieno de la internacia terminologia reto TermNet. Ĉi-jare la konkurson gajnis Aida Čížíkaĉtĉ el Litovio kaj Ariadna García Gutiérrez el Kubo.

Ambaŭ partoprenantinoj verkis interesan raporton pri sia partopreno en la kurso, kiuj estas legeblaj en la biblioteko de la Terminologia Esperanto-Centro, TEC de UEA ĉe <http://esperanto.net/tec/biblioteko.html>.

L. Szilvási, Ret-Info

Hungario – Rekorda interesiĝo pri IS –

La 20-an de septembro, la 6-an fojon ekde 1988, startis kun 26 aliĝintoj el 14 landoj la Interlingvistikaj Studoj de UAM (Universitato Adam Mickiewicz). Por subteni ci tiun bonegan programon aldone al la ĉi-jara kaj la venontjara planita subvencio de \$ 5000, ESF lanĉis specialan donacprogramon *AMU Poznanon*: por ĉiu eŭro (dolaro, eno, realo ktp.)

donacita de esperantistoj al la Interlingvistikaj Studoj en Poznano, ESF aldonos samvaloran donacon! Do, se vi donacos 10 eŭrojn kadre de tiu ĉi kampanjo, ESF donacos pliajn 10 eŭrojn, kaj se vi donacos 100 eŭrojn, ESF aldonos 100 pliajn eŭrojn al la programo, ktp. Do, anstataŭ la planitaj € 5000 nur de ESF, la programo povas ricevi *aldonojn* € 5000 pere de via donaco, kiu estos do duobligita de ESF. Tiel via donaco al la kampanjo *AMU Poznanon* helpas subteni tiun unikan programon per € 10.000 entute en 2015! Grandegan dankon al tiuj kiuj jam donacis! Aldonu vian nomon al la listo! Vi povas donaci rete (esperantic.org/amu) aŭ per UEA-konto: esfo-p. Nepre menciui por *AMU Poznanon*, kaj samtempe informu nin pri la farita donaco per admin@esperantic.org. En ambaŭ kazoj ESF faros egalkvantan donacon. Interlingvistikaj Studoj kaj ESF esperas je via partopreno kaj via malavareco... duobligita!

Esperantic.org

Rusio – Doktora disertacio pri Eo-ĵurnalismo

La 25-an de septembro 2014 Dmitrij Vlasov sukcese defendis doktoran disertacion kun la temo: «Ĵurnalismo de la Esperanto-movado en la XX-a jarcento: tendencoj de evoluo kaj tipologiaj specialaĵoj».

Ĉi-jare la eldonejo Impeto eldonis lian monografion, kiu estas bazita sur la disertacio: http://lernolibro.ru/istorija_esperanto_vlasov.

Dmitrij Vlasov naskiĝis en 1987, akiris fakajn sciojn en la geologia fakultato kaj la magistran rangon en la ĵurnalista fakultato de la Sankt-Peterburga Ŝtata Universitato.

Dum liaj studoj li konatiĝis kun Esperanto kaj ekinteresiĝis pri ĝia praktika uzo en amas-komunikiloj. Li pristudis la historion de la rusa esperantismo. En 2011 li defendis sian magistran disertacion pri la temo «Evoluo de la Esperanto-movado kaj ĝia ĵurnalistiko sub la cenzuro en la Rusa Imperio kaj en la USSR (1887-1938)».

<http://www.impeto.trovu.com/libroj/vlasov2>

<http://www.impeto.trovu.com/autoroj/vlasov>

Lingvo-Studio, L.S., www.eventoj.hu

Belgio 2 – Heidi Goes prelegas pri Timoro -

Sabaton, la 8-an de novembro je la 15-a horo (ĝis proksimume la 17-a horo) Heidi Goes prelegos pri Timoro en «Hof van Watervliet», salono 5, Oude Burg 27, 8000 Bruĝo.

Ŝi rakontos kaj montros fotojn pri la historio, lingvopolitiko, kulturo, naturo kaj vivo en Orienta-Timoro. Kompreneble ŝi ankaŭ donos

informojn pri la ĵus starigita Esperanto-klubo en la ĉefurbo Dili...



Kiel enskribiĝi? Verŝu 1 eŭron kiel kotizon al konto n-ro BE28 9799 7548 2020 (BIC: ARSPBE22) de Heidi Goes aŭ sendu retmesaĝon al heidi.goes@gmail.com. kaj pagu surloke 2 eŭrojn (membroj de 'Paco kaj Justeco' ne pagas).

Biologia kafo el Orienta-Timoro, biologia teo de aliloke kaj bio-vegetala kuketo estos inkluzivitaj.

Heidi Goes

Nova servo por lerni lingvon

(Nieuwe dienst om een taal te leren)

Peter Weide metis la sekvan mesaĝon sur la diskutliston *uea-membroj*: «Mi povas anonci, ke post longa prepartempo la lingvolerna servo *meet2talk* ofertas ankaŭ Esperantan version.» Mi volis ekkoni kaj testi la servon kaj vizitis ties retejon <http://www.meet2talk.com/Find/MembersPublic>. La ideo estas interesa. Se mi bone komprenas, temas pri la sekva: trovu en via geografia ĉirkaŭaĵo denaskan parolanton de la lingvo kiun vi lernas, kondiĉe ke li lernas ĝuste tiun lingvon, kiu estas via gepatra lingvo.

Ekzemplo: vi estas hungara, kaj alvenas en Moskvo por labori tie dum kelkaj monatoj. Vi volas lerni la rusan lingvon, kaj do vi serĉas iun rusan personon en la urbo, kiu estas lernanta la hungaran lingvon. Per la menciita servo vi trovos unu la alian, tial ke vi povos priparoli personan renkonton, ekz. ke la unuan fojon vi babiladas en la rusa lingvo (por via utilo) kaj la sekvan fojon en la hungara lingvo (por lia aŭ ŝia utilo). Tiumaniere via lingvolernado estos senpaga, aŭ pli ĝuste, vi pagas por ĝi per la instruado de via lingvo. En la supre menciita retejo de *meet2talk* Esperanto estas elektebla kiel 'uzula surfaco' kaj kiel 'lernata lingvo'.



La uzula surfaco (laborlingvo de la retejo, teksto de la klarigoj kaj de la tuta funkciado) estas en ordo, ĝia Esperanto estas utila kaj ebligas uzadon de la retejo per tiuj, kiuj parolas Esperanton kiel 'interna lingvo'.

Problemon tamen estas la elekteleco de Esperanto kiel lernata lingvo. La programo parigas la lernantojn laŭ ilia denaska lingvo, do se iu indikas Esperanton nur kiel lernatan lingvon, li neniam havos partneron, krom se la partnero indikos Esperanton kiel denaskan lingvon... kiu normale okazas nur escepte.

Do se per la retejo *meet2talk* oni volis trovi partneron por ekzerci Esperanton, oni elektu Esperanton kiel 'lernata lingvo' kaj ankaŭ kiel 'denaska lingvo'. *Szilvási László*

Pri la propedeŭtika valoro de Esperanto (*Over de propedeutische waarde van het Esperanto*)

'Propedeŭtika' estas io kio preparas al iu studo, nome ĉi tie al la studo de aliaj lingvoj.

Se Esperanto estas bonega interetna komunikilo kun nekontestablaj kvalitoj, ĝi ankaŭ aperas tre efika pedagogia ilo, speciale por la lernado de fremdaj lingvoj, kiel pruvis tion pluraj pedagogiaj provoj realigitaj en pluraj landoj. Se kelkaj pekis per amatorismo, kiel en Finnlando kaj Britio, aliaj estis realigitaj en plej severaj sciencaj kondiĉoj de Prof. D-ro I. Szerdahelyi de la Universitato Eötvös Lorand de Budapeŝto kaj de Prof. D-ro Helmut Frank, direktoro de la Cibernetika Instituto de la Universitatoj de Paderborn kaj Berlino.

Cetere multaj artikoloj estis dediĉitaj al la esplorado de la Germana Instituto en kiu partoprenis ĉirkaŭ 600 lernejoj. La rezultatoj

montras, ke la nivelo de la infanoj kiu sekvis kurson de Esperanto kiel «lingve orientivan kurson» mezume superis tiun de la kunlernejoj en la kvar fakoj: geografio, matematiko, gepatra lingvo kaj fremda lingvo (la angla).

Pro ĝia relativa facileco, Esperanto permesas trè rapide korespondi kun fremdaj klasoj, kaj tiuj leterinterŝanĝoj vekas la interesiĝon de la infanoj por aliaj landoj kaj kulturoj. Tiel, post nur kvar monatoj da kurso klaso de la kolegio Notre-Dame de la Paix en Erpent (Namuro) ricevis ĉirkaŭ 300 leterojn el 31 landoj. Tiuj kontaktoj kondukis interalie al interŝanĝaj ferioj por ĉirkaŭ dudeko da belgaj kaj slovenaj infanoj.

Kiel oni povas klarigi tion?

La granda reguleco de la gramatiko de Esperanto kaj de la vortformado faris el ĝi logikan lingvon, kiun oni povas lerni kaj per racia rezonado kaj per la memoro.

Pro diversaj kialoj Esperanto aperas altvalora helpilo por la sudo de la gepatra lingvo.

1. La analizo de Esperanto estas klara danke al siaj regulaj finaĵoj:

- o por la substantivoj *eraro* fout
- a por la adjektivoj *erara* verkeerd
- i por la infinitivoj *erari* zich vergissen
- e por la adverboj *erare* verkeerdelijk
- j por la pluralo *eraroj* fouten
- n por la akuzativo *eraron* fout (lijd.vw.)

2. Sekve la rilatoj inter la vortoj estas pli klaraj ol en la franca aŭ en la nederlanda:

- *nokto* nacht
- *nokta birdo* nachtvoegel
- *li skribas nokte* hij schrijft 's nachts
- *jam noktas* het is al nacht
- *la bono* het goede
- *bona patro* goede vader
- *bone skribi* goed schrijven

3. La vortfamilioj estas formataj en ridinde facila maniero, kiu ebligas al iu ajn esperantisto mem formi novajn vortojn uzante prefiksaj, sufiksoj kaj finaĵoj:

- as prezenco *varmas* het is warm
- is preterito *varmis* het was warm
- eg- pligrandigo *varmega* he0et
- et- plimalgrandigo *varmeta* lauw
- iĝ- = fariĝi *varmiĝi* warm worden
- ig- = fari *varmigi* verwarmen
- mal- tegengestelde *malvarma* koud
- re- ripeto *reiri* teruggaan

4. La akuzativo, formata per la finaĵo -n, indikas i.a. la rektan objekton, kio permesas liberan frazkonstruon, tiel ke subjekto kaj rekta objekto ĉiam estas bone rekoneblaj.

Komparu ambaŭ frazojn :

Ni amas lin pli ol vin. (vin : rekta objekto)

Ni amas lin pli ol vi. (vi : subjekto)

5. Esperanto estas bona propedeŭtika ilo pro:

- ĝia internacia vortaro. Laŭ la rezultatoj de studo de 4.156 radikoj 65% el ili oni retrovas en la latina, 81% en la germana, 89% en la angla, 87% en la hispana, 91% en la franca, 89% en la itala kaj 53% en la rusa ;

- kaj al ĝia karakteristiko de izola lingvo: t.e. ĉiuj elementoj estassenŝanĝe kunigataj, ekz. *pens-o*, *pens-o-j*, *pens-as*, *ne-pens-obl-a*.

6. Danke al la akuzativo la frazokonstruo restas libera. Se infano lernas aliajn lingvojn, ĝi devas transiri de unu sistemo de vortordo al alia. En la franca li devas diri : *je le vois*, sed en la angla: *I see him*. Li devas do lerni, ke li ne rajtas diri *je vois le* nek *I him see*. En Esperanto ambaŭ formoj estas korektaj : *Mi vidas lin* kaj *min lin vidas*.

Estas tiom da punktoj kiuj pledas por Esperanto en la lernejoj, sed multaj aprioraĵoj malhelpas niajn pedagogojn pristudi tiun dosieron kun objektiveco, dum paradoksale ili multe parolas pri interkomunikado, serĉante la lingvistikan panaceon.

Germain Pirlot, honora instruisto

La angla kiel 'lingua franca'

(Engels als 'lingua franca')

Kadre de la serio *Malgrandaj Lingvoj, Grandaj Lingvoj* en la Instituto Goethe de Bruselo la belga aŭtoro kaj filozofo Philippe Van Parijs prezentis siajn teoriojn pri «Lingva justeco».

En sia samnoma libro (aperinta en la germana en 2013) la aŭtoro defendas sian opinion, ke la angla devas fariĝi la *lingua franca* (speco de ĝenerala interrilata lingvo) en la Eŭropa Unio sen forpuŝi la lokajn lingvojn. En intervjuo li klarigas, kiel tiu ideo povas esti realigata, kaj kial li malgraŭ tio preferas paroli germane.

«Vi pledas por la angla kiel 'lingua franca' por plifaciligi la interkomunikadon en globaligita mondo. La kosto kiu tiel estiĝas por la konservado de la aliaj lingvoj devus laŭ vi esti pagata de la denaskaj anglaparlantoj.»

*Met de hartelijke groeten van
Kun la koraj salutoj de*

KBC-Bank Hechtel

Rode Kruisplein 5

B-3940 Hechtel

Tel. 011-73.02.20

Fax 011-73.02.21

hechtel@kbc.be

«La uzogrado de la lingvo de artikolo aŭ libro malpli dependas de la preteca protekti ĝin ol de la lingvo en kiu ĝi estis verkita. Kio estas verkita en lingvo kiun parolas nur la denaskaj parolantoj, trovas apenaŭ uzantojn ekster tiu lingvoteritorio. Ju pli la angla lingvo disvastiĝos, des pli verkoj skribitaj en la angla, kiuj malproporcie ofte estas verkitaj de anglolingvanoj, povos esti legataj de alilingvuloj.

«La EU-komisiono postulas plurlingvecon kaj strebas al la celo, ke ekster sia gepatra lingvo la civitanoj de la EU lernu du aliajn lingvojn. Kion vi pensas pri tio?»

«La multaj lingvoj en la EU estas katastrofo, se ĝi ne estas akompanata de plurlingveco. Indiferente ĉu temas pri urbo aŭ pri kontonento, oni povas nur tiam harmonie kunvivi, kiam oni povas esprimi sin en pluraj komunaj lingvoj. Eĉ se la Komisiono ne klare esprimis tion, mi tamen kredas, ke ĝi celis tion.»

«Ekzistas forta ligo inter lingvo kaj identeco de popolo. En Francio oni tradicie aplikas la regulon, ke ĉiu franco kaj francino devas regi la lingvon de la lando. Male la germana lingvoteritorio jam estis tre vasta longe antaŭ ol la germana ŝtato estiĝis. Kiel vi kiel belgo vidas la rilaton inter lingvo kaj identeco?»

«El freŝdata esploro de la Libera Universitato de Bruselo aperas, ke nur 5% de la bruselanoj unualoke konsideras sin franclingvaj kaj 1,5% kiel nederlandlingvaj, dum pli ol 54% unualoke konsideras sin kiel civitanojn de sia komunumo, oder kiel bruselanoj. Eble ankaŭ iom kiel belgojn. Mi aprobas tion. En nia nuntempa mondo estas pli grave ol iam antaŭe, ke niaj politikaj identecoj ne estas etnaj sed teritoriaj.»



«Kiun sekvon havas tiu ĉi konstato por la lingvouzo?»

«Tio ŝanĝas per nenio la valoron de ebla enkonduko de unu komuna lingvo en la Eŭropan Union, kiu permesos al ĉiuj membroj de tiu politika komunumo interkompreniĝi.»

Cordula Singer (Grenzecho)

Neferteta, la bela egipta reĝino (3) (*Nefertete, de mooie Egyptische koningin, 3*)

En la granda palaco de Tebo la reĝa edzino Teja kaj ĉiuj konkubinoj havis sian propran banejon, ankaŭ Nefertete. La banujo, kiu staris sur plialtaĵo, estis farita el travidebla alabastro. Kelkaj dekduoj da servistinoj plenigis la banujojn per oraj kaj arĝentaj kruĉoj. Laŭ signo de la juna princino du aliaj servistinoj verŝis bonodorajn esencojn en la banakvon. La antikvaj egiptoj ŝatis agrablajn odorojn. Egipto aŭ egiptino, kiu disponis pri la rimedoj, pomadis kaj oleis sin per multekostaj esencoj.

Nek la reĝo nek liaj edzinoj iam aperis nudkapaj. Ili havis la harojn mallonge tranĉitaj, kio estis pli praktika pro la multaj diversformaj kaj diverskoloraj perukoj. Por pli maljuna faraono kiel Amenotepo la III-a, kiu estis preskaŭ kalva, tiu rimedo estis eĉ beno, ĉar densa hararo estis konsiderata belega. Havi maldensan hararon aŭ kalvan kapon estis la privilegion nur de la malriĉuloj, kiuj ne povis aĉeti multekostajn perukojn. Dum la reĝino ofte portis neornamitan perukon, la faraono neniam montris sin sen signo de sia potenco kaj surhavis almenaŭ perukon kun la reĝa diademo kaj la ureoserpento. Dum oficialaj okazaĵoj servisto, kies sola tasko tio estis, metis unu el la multaj kronoj sur lian kapon. Tre malofte li surhavis la duoblan kronon, kiu pezis multe.

7. Neferteta kaj Ejo


Dum oficialaj okazaĵoj la bela mitanino montris sin ĉiam kun Teja, la Granda Reĝa Edzino, kio demonstras la bonan rilaton inter la du virinoj, kaj ke Neferteta havis kiel protektistinon la veran reganton de la lando. Sed ankaŭ la dua plej grava persono en la regno, la saĝa viziuro Ejo, sentis simpatio por la juna princino.

Amenotepo la III-a nomumis Ejon ĉefkomandanto de la armeo, ĉefarĥitekto, ĉefo de la regna arĥivo, privata sekretario, ĉefpastro, ministro pri eksteraj aferoj kaj eksterordinara ambasadoro. Tiu eksterordinara viro naskiĝis kiel filo de iu Hapuo, malriĉa *fellah* (kampulo). Li supreniris per sia kapablo skribi kaj legi, kaj edziĝis al damo Tia, kiu estas apenaŭ malpli influriĉa ol li kaj kies titoloj estis Granda Nutristino., Nutristino de la Granda Reĝa Edzino, Servistino de la Faraono, Karulino de Neferteta, Granda Karulino de Aĥnatonono'.

La plej bela tombo en Amarno estis tiu de Ejo. La eksterordinara ambasadoro verŝajne konatiĝis kun la filino de reĝo Tusrato dum unu el siaj restadoj en Mitanio kaj estis imponita de ŝia beleco. Ejo, kiu estis ankaŭ la privata instruisto kaj guvernisto de Amenotepo la IV-a, kiu poste nomis sin Aĥnatonono, certe vidis en Neferteta la idealan edzinon por la juna princo. Reveninte en Tebo li komunikis sian malkovron al Amenotepo la III-a, kiu deziris ŝin kiel propran edzinon. Ejo skribis seson da leteroj al Tusrato, petante lin sendi sian filinon. Tusrato certe ne estus cedinta, se li ne tiom bezonis la egiptan oron. Ejo bedaŭris tiun decidon de la faraono, sed devis obei. Pro letero de la 36-a jaro de la regado de Amenotepo la III-a oni rajtas dubi, ĉu inter la maljuna kaj malsana faraono kaj Neferteta ekzistis vera, efektive plenumita edziĝa ligo.

8. La vidvino

Ni skribas la jaron 1366 a.K. La mirakla statueto de la azia diino Iŝtara, kiun Tusrato sendis kune kun sia filino al Egipto por kuraci la malsanan faraonon, klare ne havis la atendatan efikon. Sed nelonge poste disvastiĝis la trista famo, ke 'La ora Horuso, la forta Taŭro, la reganto de Tebo, Amenotepo la III-a mortis' en la 38-a jaro de sia regado je la aĝo de 45 jaroj. Publikaj anoncistoj anoncis tion sur ĉiuj placoj de la urbo, kurieroj rapidis al la plej foraj provincoj de la regno: Egipto ne plu



La Granda Reĝa Edzino Teja

havis faraonon. Neferteta estis vidvino je sia 15-a jaro. Se faraono mortis kaj postlasis filon kaj filinon, tiuj ĉi kontraktis geedziĝon. La egiptanoj ne konsideris tion incesto – kaj la lando havis denove laŭleĝan faraonon kaj ‘Nova Granda Reĝa Edzino’, sed li povis svingi sian sceptron nur post naŭdek tagoj, la deviga periodo kiu separis la morto de la faraono de lia entombigo.

La faraono do mortis, sed estis publika sekreto, ke jam dum 20 jaroj Teja fakte tenis la potencon en siaj manoj, ankaŭ tiun rilate al la eduko de ŝia filo, Amenotepo la IV-a.

9. Patro kaj filo

Tiu kvara Amenotepo, kiu poste nomis sin Aĥnaton, pasigis la plej grandan parton de sia juneco eksterlande. Sed pro tiu longa forestado la patro kaj la filo fremdiĝis unu por la alia. Nenia bildo montras ilin kune, nenia tekstero nomas ilin kune. Familioportretoj de Amenotepo la III-a kun edzino kaj filinoj ne estas maloftaj, sed neniam kun la filo. Ankaŭ kiam mortis liaj geavoj Jujo kaj Tuja, la gepatroj de Teja, la estonta Amenotepo la IV-a ne estis en Tebo, kiel aperas el la donacoj retrovitaj en iliaj tomboj: ĉiuj membroj de la reĝa familio metis donacon en la tombon de la mortinta reĝo, sed ne la filo.

El la leteroj 29-a kaj 116-a de la amarna korespondado aperas, ke filo Amenotepo konis la reĝon de Mitanio, Tusraton, la patron de Neferteta, kaj la sirian reĝon Rib-Adion. Ĉar

neniu el la du iam estis en Egiptio, la juna princo povis konatiĝi kun ili nur en iliaj landoj.

Amenotepo la IV-a certe multe lernis dum lia restado en la eksterlando, kaj certe tiu universala eduko kontribuis al la plivastigo de lia spirita horizonto. Eble li jam tiam li dubis pri la multaj dioj, kiuj havis, kiel li konstatis, diversajn nomojn en la diversaj landoj.

Kiam Amenotepo la III-a mortis, lia filo trovigis tre for de Egiptio. Ĉiaokaze la morto de lia patro trafis lin tute neatendite kaj nepreparita por lia tasko. Se la juna Amenotepo restadis en Mitanio, li certe ankaŭ vidis tie la belan principinon Taduĉepan, kaj oni ne povas tute rifuti la ideon, ke ili tiam interkonatiĝis kaj enamiĝis. Sed finfine lia patro edziĝis al ŝi. Eble tio estas la kaŭzo pro kiu Amenotepo la IV-a tiel forte malamamis sian patron.

Kunregado de la plej aĝa filo kun la faraono ne estis malofta en Egiptio. Dum la Meza Regno tio jam fariĝis kutimo, sed la filo neniam regis kune kun la patro.

10. Rita dissekcio de la mortinto

Laŭtradicie la plej maljuna filo kaj sukcedanto de la mortinta faraono devis prizorgi ties entombigon. Sed ĉar la filo ne estis en la lando, tion faris la granda reĝa edzino Teja. Kiel konkubino Neferteta ne havis oficialan funkcion dum tiu rituro, kiu daŭris naŭdek tagoj, sed estis certa, ke ŝi partoprenis en la ceremonioj. Unuflanke la morto de la maljuna, malsana faraono certe signifis por ŝi liberigon. Aliflanke la estonteco de la juna kromvidvino estis necerta, ĉar ŝi nun tute dependis de la bonvolo kaj graco de Teja.

Kvankam ŝia malĝojo certe ne estis tre granda, ŝi surmetis funebrajn vestaĵojn. Ŝia vesto konsistis el libere pendanta blanka sakrobo kun multaj faldoj. Cetere, signe de funebro, ŝi ĉesis siajn ĉiutagajn ritajn lavadojn kaj ŝutis, kiel ĉiuj kromedzinoj, teron sur sian kapon.

Laŭ la egipta religia koncepto homo konsistas el korpo, animo (Ba) kaj spirito (Ka). La Ka estis la determina parto de homo, ĉar ĝi respondecis pri lia vivdaŭro, feliĉeco, malfeliĉeco, sano kaj malsano. Tiu ‘Ka’ neniam mortis, sed iam estis revenonta al la senviva korpo. Tial la korpo devis esti konservata, kaj vere similaj statuetoj estis metataj en la tombon. Por nutri la Ka, ofertablo kun nutraĵoj kaj trinkaĵoj estis metataj en la tombon de la mortinta reĝo. Teja kaj Neferteta certe murmuris la tradician

formulon antaŭ ol preni la funebran manĝon de Amenotepo la III-a :

Ofero kiun donis faraono:

Ofero konsistanta el

Milo da pano, milo da biero,

Milo da bovoj, milo da anseroj,

Por la Ka de la granda Neb-Maat-Re.

La vesperon de la mortotago – la suno jam subiris – komenciĝis ĉe la fantoma brileto de torĉoj la mumiigo de la korpo de la faraono. Tiu laboro daŭris entute naŭdek tagojn.

En malvarmeta, senfenestra ĉambro de la palaco de Melkata, teamo da kirurgoj, elektitaj el la mort sacerdotoj, pretigis la kadavron de Amenotepo la III-a al la preparado. La unua desegno sur la ventro per ruĝa inko la linion, laŭ kiu laŭlonga entranĉo estis farenda. La anatomo rapide malfermis la ventrovandon per kelkaj segantaj movoj de tranĉilo. Apenaŭ li lasis fali ĝin, li levis sian longan vestaĵon kaj rapide kuris el la ĉambro, dum la aliaj mumii-gantoj ĵetis ŝtonojn al li. Tion postulis tre malnova rito, ĉar oni konsideris kiel malbonajn homojn tiujn kiuj difektas la korpon de aliulo, kaj ili devis esti punataj pro tio.

Tiam la dua anatomo antaŭeniris kaj metis sian spertan manon en la ventrokavo, el kiu li prenis ĉiujn internaĵojn: intestoj, renoj, hepato, pulmoj, koro. Post multaj lavadoj li metis ilin en kvar specialajn kruĉojn nomatajn kanopoj kaj malfermis ilin per ŝtonaj kovriloj por teni ilin kaptitaj, ĉar oni kredis, ke ili estas la portantoj de la sentoj, precipe malsato kaj soifo.

Por atingi la cerbon, oni rompis per speciala ĉizilo la intervandon en la nazo. Per arĝenta hoketo la anatomo forigis la cerbon tra la nazo.

Tiam la kadavro estis sekigita, kio estas unu el la sekretoj, kial la mumioj de tri aŭ kvar mil jaroj apenaŭ ŝanĝiĝis. Tion oni realigis kovran-te la kadavron per sodosimila substanco.

11. La tombo en la Valo de la Reĝoj

Dum tiu ĉi procezo, kiu daŭris pli ol du monatoj, oni febre laboris en flankvalo de la Valo de la Reĝoj por pretigi la roktombon de Ameno-tepo la III-a. Jam dum sia vivo la faraono komencis tiun laboron, sed kiel multaj aliaj faraonoj, li tro longe prokrastis ĝin, tiel ke oni devis rapide labori dum la lastaj naŭdek tagoj. Skulptistoj hakis la lastajn niĉojn en la roko, pentristoj pentris la homajn figurojn sur la van-doj kaj provizis ilin per hieroglifaj tekstoj. dum la tomboceremoniestroj prizorgis la instaladon.

Grava faraono kiel Amenotepo la III-a ricevis en sia tombo pompajn litojn kaj divanojn, fotelojn, seĝojn, taburetojn, ŝrankojn, vazaron kaj eĉ paradajn ĉarojn kaj boatojn. Centoj da *uŝebtis*-oj (malgrandaj homaj figuroj) devis labori por la faraono en la postmorta mondo. Ĉar en la regionoj, super kiuj regis Osiriso, la dio de la mortintoj, oni devis labori kiel sur la tero. Kaj por povi fari ĉiujn laborojn, ili ricevis ĉiujn necesajn miniaturnajn laborilojn.

La kredo de la antikvaj egiptoj ke naturfidela statueto de la mortinto redonos al li la vivon, havis kiel konsekvencon, ke oni metis en la tombon de la faraono, kiu disponis sur la tero pri granda haremo, nudajn virinajn statuetojn, kiuj estis faritaj el ligno, fajenco aŭ ŝtono.

Ĉar malgraŭ ĉiuj antaŭrimedoj la estonteco en la regno de la mortintoj restis tre malcerta afero, la egiptanoj malavare metis en la tombojn skarabojn, amuletojn kaj talismanojn por doni magian forton al la mortinto. Neniu alia popolo en la mondo atribuis tiom da valoro al la ekipado de la tomboj, kiom la egiptoj.

La tombo de Amenotepo la III-a konsistis el ses ĉambroj kaj kvar haloj. Kiel jam dirite la tombo restis nefinita, ĉar nur unu el la kvar haloj estis provizita per bildoj kaj tekstoj.

(Daŭrigota)

Aktivaĵoj de la Limburga Esperanto-Asocio

Estintaj aktivaĵoj

Ĵaŭdon, la 25-an de septembro 2014:
An Olijslagers gvidis diversaj kartludojn.
Ĉeestis nur tri personoj.

Ĵaŭdon, la 30-an de oktobro 2014:
Ben Indestege aranĝis promenon tra sia vilaĝo. Ĉeestis kvin personoj.

Estontaj aktivaĵoj:

Ĵaŭdon la 27-an de novembro 2014:
Henri Schutters gvidos kvizon. Komenco je la 20h00 en la Kultura Centro de Peer.

Ĵaŭdon, la 11-an decembro 2014:
Zamenhoffesto en la kafejo "Onder de Toren" (flanke de preĝejo de Peer). Ĉiu mendos laŭvole kaj mem pagos sian manĝon.
Komenco je la 19h30.

Ĉiuj esperantistoj, estas ĝore bonvenaj!

Enhavo de tiu ĉi numero de ‘La Ponto’:

- Paĝo 2: Kolofono
Redaktore...
- Paĝo 4: Historio de Esperanto en Belgio (3) (*E. D’Hondt kaj P. De Smedt*)
Novaĵoj el Esperantolando:
- Belgio 1: Marcel Aerts de Hasselt mortis (*Albert Claesen*)
- Nederlando: Terminologia studo en Vieno (*László Szilvási, Ret-Info*)
- Hungario: Rekorda interesiĝo pri IS (*Esperantic.org*)
- Paĝo 5: - Rusio: Doktora disertacio pri Eo-ĵurnalismo (*László Szilvási, Ret-Info*)
- Belgio 2: Heidi Goes prelegas pri Timoro (*Heidi Goes*)
Nova servo por lerni lingvon (*László Szilvási, Ret-Info*)
- Paĝo 6: Pri la propedeŭtika valoro de Esperanto (*Germain Pirlot*)
- Paĝo 7: La angla kiel ‘lingua franca’ (*Cordula Singer, Grenzecho*)
- Paĝo 8: Neferteta, la bela egipta reĝino (2) (*Philipp Vandenberg*)
- Paĝo 10: Aktivaĵoj de Limburga Esperanto

Lernu Esperanton!

Kiom da fojoj ni ne staras en fremda lando kun frostinta lingvo, ne kapablaj paroli la lingvon de la tieaj homoj? La mondo bezonas supernacian, duan lingvon. Sola Esperanto ofertas vere demokratian solvon por tiu problemo, ĉar per ĝia ekonomia kaj politika neŭtraleco ĝi metas ĉiujn homojn sur egalan nivelon. Ĝi estas ne nur la plej facila lingvo en la mondo kaj la sola, kiu estas tute regula – ĝia grammatiko ne havas esceptojn –, sed ĝi pledas ankaŭ por egalaj rajtoj por ĉiuj popoloj. “Kiom da lingvoj oni parolas, tiom da fojoj oni estas homo”, diris imperiestro Karlo V. Tamen homo bezonas, ekster sia dialekto, nur du lingvojn: sian nacian lingvon kaj Esperanton. Esperanto ne volas anstataŭigi la naciajn lingvojn, kiel pensas multaj homoj, sed jes servi kiel komunikilo inter homoj, kiuj ne havas la saman gepatran lingvon.

Leer Esperanto

Hoe vaak staan wij niet in een vreemd land met de mond vol tanden, niet in staat de taal te spreken van de mensen aldaar? De wereld heeft een supranationale, tweede taal nodig. Alleen Esperanto biedt een echt democratische oplossing voor dat probleem, want door zijn economische en politieke neutraliteit plaatst het alle mensen op gelijke voet. Het is niet alleen de eenvoudigste taal ter wereld en de enige die volledig regelmatig is – haar grammatika heeft geen uitzonderingen –, maar zij pleit ook voor gelijke rechten voor alle volkeren. “Zoveel talen als men spreekt, zo vaak is men mens,” zei keizer Karel V. Nochtans heeft een mens behalve zijn dialect maar twee talen nodig: zijn nationale taal en Esperanto. Esperanto wil niet de nationale talen vervangen, zoals sommigen denken, maar wel dienen als communicatiemiddel tussen mensen die niet dezelfde moedertaal hebben.

Apprends l’Espéranto!

Combien de fois ne restons-nous pas bouche bée dans un pays étranger, incapables de parler la langue des indigènes ? Le monde a besoin d’une langue supranationale. Seul l’Espéranto offre une solution vraiment démocratique à ce problème, car, par sa neutralité économique et politique, il met tous les hommes sur un pied d’égalité. Ce n’est pas que la langue la plus simple au monde et la seule qui soit tout à fait régulière – sa grammaire n’a pas d’exceptions –, mais il plaide aussi pour des droits égaux pour tous les peuples. "Autant de langues on parle, autant de fois on est homme," a dit l’empereur Charles-Quint. Pourtant un homme n’a besoin, hors de son dialecte, que de deux langues: sa langue nationale et l’Espéranto, qui ne veut pas remplacer les langues nationales, comme pensent certains, mais servir de moyen de communication entre les gens qui n’ont pas la même langue maternelle.